Михаил Лермонтов,

La anĝelo

tradukita de Boris Mirski

Kun kanto solena en nokta ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj en rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html`.

Михаил Лермонтов,

Der Engel

tradukita de N. N. 98

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)

Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo `http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html`. *Vidu ankau:* `http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm`.